

Raymond Schwartz, lia vivo kaj verkaro,
la 4-a kajero de la kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 702, 1977.03.23 & 25 & 26

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Kun la titolo Raymond Schwartz, lia vivo kaj verkaro aperis en la kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista la prelego, kiun sinjoro Roger Bernard prezentis en majo 1974 en Renens, apud Lausanne, en la kadro de kultura semajnfino.

A.- En tiu ĉi 22-paĝa kajero Roger Bernard, post enkonduka skrizo pri la aventur-riĉa vivo de Raymond Schwartz, interese promoenigas nin en la verkaron de sia amiko, farante, se montriĝas necese eĉ sufiĉe longajn citaĵojn el la analizitaj spritaĵoj, noveloj, romanoj aŭ eseoj. Fakte tiu ĉi 4-a kajero de la kolekto Studoj estas taŭga enkonduko al la legado de la verkaro de Raymond Schwartz. Tial ni kuraĝigas la grup- kaj kursestrojn vicigi tiun ĉi studon en sian libron. Atendante pli detalan biografion kaj verk-analizon pri la aŭtoro de 'Kiel akvo de l' rivero' kaj 'El mia ridpunkto', ni emos reveni al la sciigoj, kiujn alportas Roger Bernard, la sekretario de la esperanta akademio.

Cl.- Ĉar la vivo de Raymond Schwartz estas malpli konata ol lia verkaro, ni hodiaŭ citos al vi plurajn erojn el la biografia raporto. Tiel vi eble ekintimiĝos kun neordinara vivo.

A.- Jen ni citas : « Raymond Schwartz naskiĝis la 8-an de aprilo 1894 en la urbo Metz. Metz estis la ĉefurbo de tiu parto de franc-parolanta Loreno tiam aneksita, post la franca-prusa milito de 1870, de la 2-a germana Imperio. Malgraŭ la nigreco (Schwarz signifas 'nigra') de la nomo, liaj gepatroj hejme parolis, kaj sekve ankaŭ li, la francan lingvon. La franca estis do lia gepatra, sed pro la fakto, ke li devis viziti la germanan lernejon, li fariĝis perfekta dulingvulo. Liaj studoj estis plej klasikaj : helena kaj latina, poste la angla, poste la itala kaj la hispana.

Cl.- Kiam eksplodis la unua mondmilito, li estis kompreneble mobilizita en la germanan armeon, kaj sendita, kiel ĉiuj alzacanoj-lorenanoj, al la rusa fronto, kie li iĝis leŭtenanto. En 1918, post la malvenko de Germanujo, li fariĝis plenrajte franca civitano. Ne finiĝis tiam lia soldata kariero : pro tio ke li forgesis deklari al la arma administracio la naskiĝon de la du gefiloj, li estis malgraŭ sia 45-a jaro mobilizita en 1939 en la francan armeon kiel simpla soldato: duaranga kanonisto, post du monatoj oni resendis lin hejmen. Sed en 1945 la franca registaro komisiis al la banko, kie li havis jam gravan postenon, reakiri havaĵon en Vieno kaj Prago. Li estis do tien sendita, sed tiam rajtis vojaĝi al la okupataj teritorioj nur uniformuloj, kaj oni sekve vestis lin per ia speco de generala kostumo. Ĉu ne stranga sorto militista ĉe tia pac-amanto: leŭtenanto, simpla soldato kaj kvazaŭ generalo ? »

A.- Post tiu resumo pri la militista kariero de Raymond Schwartz, Roger Bernard tiel skizas lian profesion vivon : « Enirinte tuj post la unua mondmilito en bankon, li rapide atingis altajn ŝtupojn, ĉar lia spirito, nutrita de solida kulturo, estis larĝe malfermita al ĉio, li eĉ elpensis, por sia banko, telegrafan kodon multe pli ŝparigan ol la ĝistiamaj. Kiam li emeritiĝis, li estis unu el la kundirektoroj de grava pariza banko. »

Cl.- Sekvas longa priskribo pri la esperantisteco de Raymond Schwartz, el kiu ni povos citi nur kelkajn eretojn : « La lingvon li lernis frue, probable kiam 15-jara gimnaziano. En sia hejmurbo li fondis en 1913 esperantistan grupon sub la nomo 'Amika Rondo'; kaj jam tiam li publikigis siajn unuaj rimaĵojn en 'Tutmonda Espero'. Post la unua mondmilito, veninta al

Parizo, li fondis sub tiu sama nomo Amika Rondo kunvenon de junaj kaj ridemaj esperantistoj, kiu kunveno baldaŭ transformiĝis al tiu glora ‘Verda Kato’, imite al Montmartraj kabaretoj, en kiu li povis senbridigi sian spiriton kaj fantazion antaŭ la multfacetaj eventoj de karuselanta universo. Li aktivis en la kabareto dum ses jaroj, kaj la plejmulton el siaj versaĵoj li poste kolektis en tiun verdkatan Testamenton, kiu tiam mirigis la tutan esperantan mondon.

A.- Tiel komenciĝis la esperantista kariero de Raymond Schwartz. Se vi deziras lerni pli pri ĝi, akiru la 4-an kajeron de la kolekto Studoj, kies titolo estas ‘Raymond Schwartz, lia vivo kaj verkaro’.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*